



# ANARKIO

INFORMA MONATA  
BULTENO  
APRILIO 2011  
N<sup>o</sup> 08



## Brazila Laborista Kongreso uzos esperanto!

En la 4<sup>a</sup> Brazila Laborista Kongreso okazita en Portalegre en monato Januaro 2011, ĝi aprobis la stimula de esperante inter ĝiaj asociitoj kaj en la internacia komunikado. Vidas vin la teksto pri tio.

Ĉu bezonos la Brazila Laborista Konfederacio (BLK) stimuli la esperanto al internacia komunikado?

Konsidere ke la oficialaj lingvoj de Internacia Laborista Asocio (ILA) estas hispana kaj angla; ĝi estas ekspluatadajn kaj opresajn lingvojn; ĝiajn uzas em nia asocio ne estas kompleta kaj nek ĝiajn ne atentis la kultura mondo;

La esperanto ne estas anstataŭanta idioma aŭ ekspluatada idioma;

La esperanto estus la senegala idioma al internacia raporto kio garantianta la interŝanĝo de la diversaj kulturoj sem granda bezona investado en idiomaj traduktoj, la esperanto unuigas popoloj en tuta mondo.

Nia organizacio devas prepari nia samideanoj al esperanta lernas kaj disfandi ĝin em niaj aktivecoj kaj em niaj internaciaj komunikadoj, kiel simbolo de nia kompromiso kontraŭ kultura ekspluatado kaj opreso.

## Kio estas religio?

De Andry Larilot

La demando povas ŝajni senutila. Sed ekde kiam oni ĝin anteme ekzamenas, oni ekvidas ke ĝi entenas multe da obskuroj.

Estas multe malfacila rekonti ĉe la aŭtoroj (kredantoj aŭ ne) difinojn vere precizaj kaj kontentigaj de religio.

La etimologio diras al ni, ke religio (religare, tio kio ligas) ne estas alia afero ol ligo. Duobla ligo, kiu ligas la homon al sia Dio, unueĵ kiu ligas la homojn inter si, poste, ĉirkaŭ sama kredo.

Kia ajn estu vidpunkto kie oni lokiĝas, oni devas konsenti ke tiu difino estas mlasufiĉa.

“Ligo inter la homo kaj Dio”, oni diras, sed oni ne difinas Dion kaj konservence, la ideo de religio ripozas sur nenion

solida.

“Ligo kiu arigas ĉirkaŭ komunaj kredoj ian nombron da homoj”, oni diras ankoraŭ.

Se ĉu tiu difino ne estus tro larĝa? Oni kutime parolas pri “socialisma religio”, aŭ pri “religio anarkiisma”, de “vegetarana religio”, “monarkia”, “arta”, kion mi escias ankoraŭ? Ĉu tioma pligrandigo de tiu termino ne estas troa? Politika partio, tiom dogma ĝi estu, ne estas religio.

Filozofia sekto aŭ alia, ĝi estu impregnita de troa mistikismo, ne nepre konsistigas religion kiel ni ĝin elmontros.

Tolstojo citas ian nombron da difinoj. Ekzemple, tiun de Goblet Dalviela (Goblet d'Alviella)? “La religio estas iu maniero por la homo realigi sian relaton antaŭ la superhomaj kaj misteraj fortoj de kiuj ĝi kredas sin dependa”. Tiun de Vaŭvendargo (Vauvenargues) “La devigoj antaŭ Dio, jen la religio”. Sed Tolstojo proponas difinon pli kompleta? “La vera religio, estas, konforme al la racio kaj la scio de la homo, la rilato establita far li antaŭ la senfina vivo kiunlin ĉirkaŭas, kiu ligas ĝian (la homan) vivon kun tiu senfino kaj lin gvidas em ĝiaj agoj”.

Burnufo (Burnouf) precizagas, prave laŭ mi, ke la persona kaj intima koncepto de Dio, ne sufiĉas konsistigas religion.

Oni daŭrigas ...

**“Senekonomia kaj sensocia egaleco, politika egaleco estas iluzio”. M. Bakunin**

**\*\*\* JANUSZ REICHEL -  
Helpon! Polico!**

Helpon! Polico!

Policisto defendas min antaŭ trompanto  
Policisto defendas min antaŭ bandito  
Policisto defendas min antaŭ krimulo  
Sed kiu defendos min antaŭ policisto?

Helpon! Polico!

Policisto defendas min antaŭ ŝtelisto  
Policisto defendas min antaŭ murdinto  
Policisto defendas min antaŭ mafio  
Sed kiu defendos min antaŭ policisto?

Helpon! Polico!

Policisto defendas min antaŭ la ŝtelo  
Policisto defendas min antaŭ agreso  
Policisto defendas min antaŭ seksperforto  
Sed kiu defendos min antaŭ policisto?



**MARŜO DE  
L'ANTIFAŜISTOJ**

dediĉata al la esperantista roto  
'Antŭen'.

Suno hispana, ĉiela lazuro,  
Dolĉa kisado de venta kares'...  
Sango, ruinoj, perforto, teruro,  
Pafoj fusilaj, kanonaj, sem ĉes'.

Sonu signalo  
al la batalo,  
marŝu kun ard'  
sub nigra kaj ruĝa

standard'.

Bando faŝista de sangaj tiranoj  
Volas forpreni la ĝojon de l'viv'  
Premi la gorgon al bravaj hispanoj,  
Rabi, bruligi per mano de rif'.

Sonu signalo  
al la batalo  
sub ruĝa stel'  
ke mortu ribel'.

Flugas en alto germanaj pilotoj,  
Bombojn ĵetante al placa amas';  
Marŝas diboĉe faŝistoj en rotoj,  
Pafas virinojn, infanojn em ĉas'.

Do al batalo  
sonu signalo  
kontraŭ svastik'  
pro la Anark'.

Sed jam proletoj leviĝas defende,  
Forte kuniĝas labora popol'  
Fronten ekmarŝas heroe senplende  
Bravaj taĉmentoj kun venka ekvol'.

Do al batalo  
sonu signalo,  
marŝ' kun rapid'  
pro nigra kaj ruĝa

Madrid'.  
Tuta jam mondo kompreni  
komencas  
Ĉie ekluktas ĝi kontraŭ faŝism'  
Nigro kaj bruno egale esencas,  
Mondo já estas tutec-organism'.

Do al batalo  
sonu signalo  
kontraŭ svastik'  
pro la Anark'.

Venis ni ankaŭ ali-nacianj  
Kune batali sur lipoj kun kant',  
Helpi defendon al fratoj-hispanoj,  
Ĉiujn kunigas nin já Esperant'.

Sonu signalo  
al la batalo  
Marŝ', marŝ' sen lac'  
pro monda la pac'.

Adpate de E. Miĥalski

**Ĝelaboristoj emancipigxas per mem laboro**

**Ni bezonas volontulojn!**

Nia iniciatemo bezonas volontulojn por skribi, traduki, desegni aŭ por iu ajn kontribuajo.

Ĉia helpo estas bonvenan, dankon!

Sanon kaj anarkion!

Kontaktojn:

**Fenikso Nigra**

**CP: 999 - CEP 13001-970 Campinas - San-Paŭlio**

**Aŭ**

**Sindikato el Artaj kaj Diversaj Oficoj Laboristoj de Campinas (SADOL-Campinaso) BLK - ILA**

**CP: 5005 - CEP 13036-970 - Campinas -San-Paŭlio**

**m.e.: fenikso@anarkio.net m.e.: campinas@fosp.cob-ait.net**

**http://anarkio.net http://fosp.anarkio.net http://cob-ait.net**

